

Fajrero

ESPERANTO-FAKO DE ZK ROH TŽ VŘSR

JUNIO 1959 – n-ro: 2

Redaktoro: Jan Pomykacz
Responza red. : Inĝ. J. Werner.
Redakcia adr. : OSTRAVA 15,
Na Lachu 6.

Administranto: Vl. Kočvara,
OSTRAVA 8, Kamenec 251/3.
Ĉeĥoslovakio.

FAJRERO estas bulteno
de junaj esperantistoj
en Ostrava-regiono.
Aperas laŭbezone.

Ilustris Inĝ. ark. M. Kalný.

EL LA ENHAVO:

Ĉs. Esp. komitato 2
Zamenhof en Litovujo
(Al Daŭmbrankas) 3
120 jaroj de TŽVŘSR 5
LA SPEGULO de grupoj 6
VERDAJ SPLITTOJ el la
mondo 10
Ni diskutas pri inform. 14
LINGVA ANGULETO 15
LEKANTETO 16
E-Societo en Bombaj 17
Ano kaj morto
(Georgo Deŝkin) 18
Poemo pri bona vorto
(Míla Němcová) 18
El "Dekduo da pantomimoj pri amo" (Jar.
Seifert) 18
Ĉu vi memoras (MIRO) 19
KONKURSO de Fajrero 19
SET Červená, Lančov 20
SKE Bělohrad 21
Vespera kanto 21
Enigma kurso 22
La redakcio kontaktas 22
Libroj, prosp. Recenzoj 23

Iom da ekeoliko.

De la jaro 1959 forpasis jam preskaŭ duono kaj en viajn manojn venas nur la 2-a numero de Fajrero. Inter vi kaj ni estas io neeldirita, pri kio ni ne ŝatas paroli, kaj sen kio vi povas nesufiĉe aprezi nian laboron. Tamen estas necese iom skizi la aferon pri nia nova bulteno.

La eldonan taskon prenis fine de 1958 E-fako de la uzinklubo de VŽKG, kie la kondiĉoj estis tre favoraj: forta rondeto kun pluraj lingve perfektaj membroj, pro sia longjara meritplena laboro havanta bonan pozicion en la uzina klubo, kies komitato cetere la eldonadon de Fajrero tre favoris. SED mankis mono, eldono de la 1-a n-ro estis forŝovata ĝis marto. SED tiam post unumonata penego likvidis ĉiujn esperojn la uzina presejo de VŽKG en Ostrava-Vítkovice kaj nur meze de aprilo estis decidite, ke la eldonadon traneprenos ni, esperantistoj ĉe la uzina klubo de Ferfabrikoj de Granda oktobra socialisma revolucio en Třinec.

Estas por ni honorigo, ke esperantistoj en Ostrava-regiono legas nian bultenon kaj kontaktas kun ni. Skribu al ni pri ĉio, kio okazas en viaj rondoj, fariĝu kunaŭtoroj de "Fajrero"! Eldon.

ĈEHOSLOVAKA ESPERANTO-KOMITATO

eldonis la 1-an numeron de "Zprávy Československého esperantského výboru" (Informoj de Ĉeĥoslovaka Esperanto-komitato). Ĉar la komitato, malgraŭ sia relative longa ekzisto, estas institucio nur suprajne konata, ĝis nun nesufiĉe plenumanta kontakton kun la vastaj tavoloj de la esperantista publiko en nia regiono (certe kritikinda afero), ni prezentas al vi tradukon de la fruntpaĝa deklara artikolo:

Estimataj amikoj!

Por helpi al Esperanto-rondetoj ĉe la klerigaj aranĝoj de la naciaj komitatoj kaj ROH estis starigita ĉe la Kleriga instituto en Praha Ĉeĥoslovaka Esperanto-komitato. La komitato direktas sian agadon laŭ la statuto, kiun aprobis la ministro de lernejoj kaj kulturo. (Publikigita en "Věstník ministerstva Školství a kultury" n-ro 9 el la 31. 3. 1959 - rim. de red.).

Laŭ tiu ĉi statuto estas ĈEK sola organo, kiu rajtas reprezenti ĉs. esperantistojn ekstere. En tiu ĉi senco ĝi jam informis la centrajn kaj naciajn Esperanto-organizaĵojn en unuopaj ŝtatoj.

Ĉs. Esperanto-komitato havas jenajn membrojn: k-doj Josef Ambrož (Brno), MUDr. Ľudovít Izák (Martin), PhDr. Jaromír Jermář (Praha), Theodor Kilian (Třebíč), Drahomír Kočvara (Ostrava), Jiří Kořínek (Brno), Adolf Malík (Praha), PhDr. Magda Šaturová (Bratislava), Václav Špůr (Doksy).

La komitato elektis ĉi tiun estraron: Dr. Jaromír Jermář (prezidanto), Adolf Malík (sekretario), Václav Špůr (kasisto). Ĉiuj membroj de la estraro estis membroj de estinta Esperanto-Asocio en ĈSR. Adreso de la komitato estas: Ĉs. esperantský výbor, Osvětový Ústav v Praze 12, Blanická 4. Tien ankaŭ sendadu ĉiujn korespondaĵojn.

Kiel ĉe la ceteraj interesrondetoj, la agado de ĉeĥoslovakaj esperantistoj koncentriĝas en klerigaj kunularoj (osvětové besedy), uzinaj kluboj, Ruĝaj anguletoj k. s.

Ĉeĥoslovaka Esperanto-komitato helpados al la Esperanto-rondetoj per eldonado de metodologiaj materialoj, Esperanta literaturo, en organizado da kursoj kaj seminarioj kaj en aliaj okazoj tiel, ke ĉeĥoslovakaj esperantistoj plene realigu sian belan taskon, servi al batalo por la paca kunvivo kaj interkompreniĝo inter la nacioj; ĝi klopodos, ke la esperantista publiko estu ĝuste informata pri nia kulturo, vivo kaj laboro, pri nia strebado elkonstrui la novan socialisman socion.

Ĉs. Esperanto-komitato faros ĉion, ke ĉiuj esperantistoj plene partoprenu la batalon por la paca kunvivo kaj interkompreniĝo inter la nacioj; ĝi klopodos, ke esperantista monda publiko estu ĝuste informata pri nia kulturo, vivo kaj laboro, pri nia strebado elkonstrui la novan socialisman socion.

Ĉs. Esperanto-komitato volas montri al la monda kaj nia publiko, ke Esperanto servas al interkonatiĝado de la nacioj kaj ke ĝi povas fariĝi efika rimedo en la batato per paco kaj pli bona socia kaj politika estonto de la mondo.

La komitato plene konsclas, ke siajn taskojn ĝi povas plenumi nur tiam, se ĝian laboron subtenos ĉiuj ĉeĥoslovakaj esperantistoj; ĝi firme kredas, ke povos fidi ties helpon.

Ĉs. Esperanto-komitato

En unu el la rubrikoj de ĉi bulteno estas kaj estos informoj el ĈEK, instrukcioj, respondoj k. s. , la alia mencio pri agado de la grupoj. Tiukaŭze la grupoj estas petataj pri regula raportado al la supre menciita adreso. Sed ĉiam bonvolu skribi ĉeĥe aŭ slovake, ĉar la korespondaĵoj trairas unue la Klerigan instituton. Sciigu ankaŭ vian precizan adreson, korespond-adreson kaj nomojn de la funkciuloj, por ke la komitato povu kompili grupan

adresaron.

1859-1959 PREPARU DIGNAN FESTON DE LA ZAMENHOF-JARO!

Prof. Dr. Al. Dambrauskas:

ZAMENHOF EN LITOVUJO

(Eltiraĵo el la verko "La estingiĝintaj lumiloj").

L. L. Zamenhof, studante en Moskvo, interkonatiĝis kun studenta pri farmacio Pikover, kiu, fininte la studon, edziĝis al la fratino de Zamenhof, Fania kaj fondis en Veisiejai apotekon. Baldaŭ post tio Pikover ekmalsanis je psika malsano; invitive de la fratino la frato de Zamenhof - Leono - ekloĝis en Veisiejai, kaj poste, ricevinte kuracistan diplomon, ankaŭ Ludoviko Zamenhof. Komence la kuracista praktiko tie ĉi al li tute ne sukcesis, ĉar la popolo ne estis kutimiĝinta invitadi kuraciston nekapablante pagi viziton de kuracisto ĉe malsanulo. Krome Zamenhof havis arogantan konkuranton - kuracist-helpanton Kukliauskis, kiu, estante loka homo, havis pli grandan fidon inter la popolo. Zamenhof vizitadis nur malsanulojn en la bienoj, situantaj en ĉirkaŭaĵo.

Foje, en la printempo 1886, revenante el Gardinas (nelitove Grodno), el la vilaĝo tute apud Veisiejai, li estis haltigita de virino pro doloro ŝiranta al si la harojn. Montriĝis, ke ŝia malgranda filineto, kiu malsanis pro tuso, estis tute perdinta la konscion pro medikamento donita de Kukliauskis. Zamenhof esploris la korpon de la knabineto; ŝi dum tri horoj certe montris nenian vivosignojn. Zamenhof komencis revivigadi ŝin per diversaj kuraciloj kaj la infaneton revivigis. Por sia laboro li nenion prenis kaj eĉ restigis unu rublon por aĉeti vinon al la malsana infano. Baldaŭ tra la tuta regiono disvastiĝis famo pri mirakla flavrubarba kuracisto, kaj Zamenhof fariĝis estimata de ĉiuj. De malriĉuloj li prenadis nenan honorarion, kaj vizitante riĉajn malsanulojn, kolektadis oferojn por medikament-aĉeto al tiuj, kiuj ne kapablas pagi mem. Estante bonkora, li helpadis ankaŭ aliajn homojn en malfeliĉaj okazoj. Foje forbrulis konstruaĵoj al unu terkulturisto, Zamenhof fordonis al li tutan sian monon tiel, ke reveninte hejmen, li mem devis pruntepreni. En 1886 al unu hebreo Veisiejaiano, veturiganta Zamenhofon al Kaunas, falis la ĉevalo - kaj la mizerulo ploris, perdinte sian pandonanton. Zamenhof, tuŝita de liaj larmoj, donacis al li 50 rublojn por aĉeti alian ĉevalon.

Alian fojon en Veisiejai li estis invitita al iu pro la malario arde febranta knabino. La patrino pro doloro estis preskaŭ freneziĝinta. Dum tutaj du monatoj Zamenhof ne povis forgesi ŝian ploradon kaj veadon. Pro tio li decidiĝis forlasi la komunan praktikon kaj elektis la specialecon de okulkuracisto. Kiel ni vidas, la Veisiejai'a vivperiodo estis periodo de gravaj ŝanĝoj kaj entreprenoj en la vivo de Zamenhof.

En 1887, reveninte el Vieno (Wien) post la oftalmologia kurso, Zamenhof, kvankam li jam estis ekloĝinta en Varsovio, ofte vizitadis sian fratinton en Veisiejai kaj la tutan someron tiujaran li pasigis boatpromenante sur la lago Anĉia, ĉar alimaniere li ne povis ŝin kaŝi de la serĉantaj pacientoj. Multe li laboris ankaŭ nokte; ja tiam li preparis por presigo vortaron kaj gramatikon de la aperonta lingvo Esperanto. Dumsemajne li forbruligadis po 3 funtoj (1 f. = 0,4095 kg) da kandeloj. El Veiaieiai li ofte veturadis al Kaunas, kie li estis fianĉiĝinta al Klara Zilbernik, filino de unu Kaunasa komercisto.

Nome en tiu tempo la fianĉino antaŭvideme instigis Zamenhofon eldoni lernolibron de lia nova lingvo, kaj ŝia patro - estonta lia bopatro - donis al Zamenhof necesan monon por eldoni unuajn librojn Esperantajn. Ofte ja okazas, ke eĉ plej bonaj ideoj restas neefektivigitaj nur pro manko de mono, kaj tial oni povas tute prava demandi, ĉu ne sole

dank' al tiu ĉi helpo de Litovuja komercisto, kiu kapablis ŝati ankaŭ ideojn altajn, la mondo nun havas la plej genian eltrovon de la XIX-a jarcento - ESPERANTON. La 14-an de julio 1887 la cenzuro permesis presi la unuajn lernolibrojn esperantajn. Aŭtune de la sama jaro Zamenhof forlasis Veisiejai, kaj de tiu tempo li kaj lia edzino Litovujon vizitadis nur gastante ĉe siaj gepatroj-gebopatroj. . .

Legu: D-ro A. Möbusz, "Dokumentoj de Esperanto", Berlin Ellersick pĝ. 79.

El "Vivo de Zamenhof" de Dr. Edmond Privat.

Por esprimi tiun ĉi noblan fakton, la Kaunasa magistrato en la jaro 1926 nomis la straton, en kiu loĝis Zilbernik, ZAMENHOFA strato.

Dum la okupado germana tiu ĉi nomo estis forigita kaj, bedaŭrinde, la strato eĉ ĝis nun ne estas renomigita kiel Zamenhofa (malgraŭ tio, ke en la loka gazeto jam estis menciita tia neceso).

Kaunas 1958 Esperantigis: Kl. Naudzius, Kaunas.

120 JAROJ DE FERFABRIKOJ EN TŘINEC

La ferfabrikoj de Granda oktobra socialista revolucio en Třinec, kiuj en la kuranta jaro solenas 120-jaran datrevenon de sia fondiĝo, estas unu el la plej grandaj metalurgiaj fabrikoj en Ĉeĥoslovakio. Ili produktas plej multe da fero kaj ŝtalo por nia industrio, estas unu el gravaj kolonoj de nia nacia ekonomio. Třinec'a ŝtalo migras ne nur al ĉiuj anguloj de nia respubliko, sed oni povas diri, al ĉiuj anguloj de la mondo, kaj ĉie bone reprezentas nian patrujon.

Třinec'aj ferfabrikoj estis fonditaj en la jaro 1839. Speciale grava limŝtono de ilia evoluo estis la jaro 1872, kiam estis konstruita la fervojo Bohumín-Košice, kiu kunligis la urbon Třinec kun la mondo.

Kun kreskanta deziro pri metalurgiaj produktoj kreskis ankaŭ la fabriko, kiun en la jaro 1906 aĉetis Mineja kaj metalurgia kompanio. Grafoj, princoj, kavaliroj, bankistoj, industriistoj kaj grandbienuloj fariĝis posedantoj de la fabriko. La ĉefan rolon ludis precipe germanaj, ĉeĥaj, anglaj kaj francaj kapitalistoj.

En la jaro 1945, post liberigo de la Ruĝa armeo estis definitiva kunkalkulite kun la regado de ekspluatantoj, Mastro de la fabriko fariĝis la popolo, kiu komencis konstrui sian novan, feliĉan vivon.

La fabriko ascendis al grandega, neniam antaŭsentita prospero. Elkreskis novaj altaj fornejoj, la kvina kaj la sesa, tria ŝtalejeto, nova blomimigo kaj vico da pluaj produktaj establaĵoj. Nur de la jaro 1945 ĝis la jaro 1955 la registaro dediĉis por la industria konstruado en Třinec unu miliardon 886 milionojn da kronoj.

Kun la fabrikevoluo pliboniĝis ankaŭ la socialaj kaj laboraj kondiĉoj de Třinec'aj metalurgistoj. Speciale granda atento estis dediĉita ankaŭ al loĝej-konstruado. Dum la kapitalistoj en 110 jaroj, tio signifas ĝis la j. 1945, elkonstruis 385 laboristajn loĝejojn, donis la respubliko de post la j. 1945 ĝis 1953 al la laboristaro en Třinec 1775 loĝejojn - 4,6 oble pli ol la kapitalistoj dum 110 jaroj.

En industria kaj loĝej-konstruado ani konstante progresas. En la dua kvinjara plano oni kalkulas por Třinec preskaŭ kun unu miliardo da kronoj kaj 61 milionoj estas uzitaj en konstruado de loĝejoj.

En Třinec laboras konkorde ĉeĥoj, poloj kaj slovakoj. Ideo de internaciismo akompanas komunan strebadon, en kiu oni atingas rimarkindajn rezultojn. La fabriko fariĝis

kelkfoje portanto de la Ruĝa standardo de la registaro kaj de la Centra sindikata konsilantaro kaj ankaŭ de Ruĝaj Flagoj de la ministerio de metalurgio kaj ercminejoj kaj de la Centra komitato de la sindikata federacio. Plej grandan agnoskon oni tamen ricevis en la jaro 1957, kiam okaze de la 40-a datreveno de la Granda oktobra socialista revolucio la metalurgistoj de Třinec estis ordenitaj per la Ordeno de laboro.

Tiu ĉi alta ordenigo inspiras ilin ankoraŭ pli bone ol ĝis nun plenumadi ĉiujn taskojn de la socialisma konstruado.

LA SPEGULO DE LA GRUPOJ

MONTEKSKURSO AL "JAVOROVÝ"- 4. -5. 7. 1959.

Kiel ĉiujare, Esperanto-rondeto en Třinec aranĝos en julio (dimanĉe la 5-an) sian jam tradician ekskurson al montaro. Granda parto de "dimanĉaj" turistoj preferas el la vico de sileziaj montsuproj la monton Javorový, ĉar oni povas tute facile atingi la pinton per ŝnurvojo kaj de tie oni povas laŭ montodorsoj atingi pluajn supraĵojn. Pro tiu kaj ankoraŭ aliaj motivoj estis por ĉi jaro elektita Javorový. Tie ankaŭ okazos laborkunveno de la rondeto.

Sabate la 4-an de julio en antaŭvespero de la ekskurso oni aranĝos en la kafejo KLUB en Třinec (la sama loko kiel pasintjare) amuzvesperon kun kultura programo. Ankaŭ ĉi-jare promesis nin viziti kelkpersona grupo de polaj eaperantistoj el Polski Cieszyn (temas pri studentinoj de pedagogia liceo kun profesoro), kiuj volas nin surprizi per sia gaja kultura enmetaĵo.

Ĉe tiu okazo la grupo en Třinec invitas vin ĉiujn partopreni ĝiajn aranĝojn. Bonvolu anonci vian decidon pri via partopreno per poŝtkarto, por ke oni povu rezervi por vi lokon ĉe tablo kaj tranokton. En la kafejo KLUB estas aranĝataj amuzvesperoj ĉiumerkrede kaj ĉiusabate por vasta publiko - povus do okazi, ke por esperantistaj gazetoj ne estus sufiĉe da loko. La vespere komenciĝas je la 18-a horo. Ankaŭ tranoktebloj ne estas en Třinec sufiĉaj. Tial skribu tuj, por ke ĉio povu esti prizorgita. La kutima seminario ne estas nunjare aranĝata.

Se hazarde dimanĉe la 5-an de julio "S-ta Petro" sendus al ni anstataŭ bela vetero pluvoriĉan tagon (kiel pasintjare), ni atentigas, ke la kunveno okazos antaŭtagmeze je la 9-a horo en la kafejo KLUB kie okazus la laborkunveno de la rondeto. Adr. : KOHUTEK, P. Těšínská 378, Třinec I.

Nova Esperanto-kurso rekte en la uzino en Třinec.

Antaŭ nelonge komenciĝis inter la junularo de estontaj trafikistoj nova kurso. La intereso estas fakte tre granda. La kurson vizitas ĉirkaŭ 30 personoj el diversaj lokoj de nia ĉirkaŭaĵo. La kurso okazadas unufoje semajne, instruas s-ano Kohutek.

Ĉar inter la uzinaj okupitoj estas granda intereso pri la Internacia lingvo, oni intencas aranĝi la duan kurson, por progresintoj - kaj provi aranĝi ankaŭ la partian instruadon esperantlingve por partianoj - esperantistoj.

EN ESPERANTO-RONDETO ĈE ZK ROH de Třinec-ferfabrikoj.

Pri la agado de nia E-rondeto ĉe ZK TŽVŘSR scias nur nemulte da eksterlokaj esperantistoj. Kelkpersona aktiva kolektivo de nia E-rondeto penas agrabligi la vivon en libera tempo ne nur al siaj rondetanoj, sed ankaŭ al la vasta publiko de nia ferfabriko per organizado de diversaj kulturaj kaj amuzaj aranĝoj. Samtempe ni gajnas novajn homojn al

kursoj kaj larĝigas la nombron de E-simpatiantoj.

En la kadro de nia rondeto estis dum kelkaj pasintaj jaroj organizitaj kelkdekoj da vojaĝprelegoj de s-ano Vítek el Mělník pri skandinaviaj ŝtatoj. La prelegojn vizitis kelkaj miloj da aŭskultantoj. S-ano Vítek per siaj interesaj prelegoj sukcesis gajni junajn infanajn korojn en pluraj sileziaj lernejoj. Ni donis al ni taskon unuavice varbi por Esperanto junularon. Ni devas plijunigi niajn vicojn, se ni volas sukcese disvastigi Esperanton inter la homaro.

Nia rondeto ĉiujare aranĝas ankaŭ kelkajn aŭtobusajn ekskursojn por ebligi al siaj rondetanoj kaj amikoj, ekkoni belajn regionojn de nia patrujo. Pasintjare ni aranĝis naŭtagan aŭtobusan ekskurson tra Slovakio. Jam antaŭ la ekskurso ni letere interkontaktis kun E-rondetoj en kelkaj slovakaj urboj, tra kiuj ni veturis kaj pritraktis kun ili reciprokan renkontiĝon. Ĉe la partoprenintaj esperantistoj ĝi postlasis belajn rememorojn je agrablaj momentoj inter alilokaj gesamideanoj.

Por tiu ĉi jaro ni planas kvar ekskursojn. Unu el ili ni jam realigis - dum du kaj duona tagoj ni traveturis la distriktojn Opava, Bruntál kaj Krnov, ni vizitis kastelojn, banurbojn, stalagmitajn grotojn kaj aliajn vidindaĵojn. Ankaŭ ni ascendis la plej altan montsupron de Jeseníky - Praděd, kie ni vidis antaŭ kelkaj tagoj falintan observan turon (3. 5. 59).

Pluaj ekskursoj: la 27-an kaj 28-an de junio al Strážnice; en julio, de la 11-a ĝis 15-a, kvintaga ekskurso tra la nord-orienta Bohemio, kie ni esperas renkontiĝi kun lokaj gesamideanoj. Lasta nia ekskurso estas aranĝota en septembro al Brno por viziti la internacian foiron.

ESPERANTO ENPENETRAS LA PIONIRAN DOMON EN TŘINEC.

Nia E-rondeto ĉe ZK TŽVŘSR envicigis en sian labor-planon por la jaro 1959 krom aliaj taskoj kaj fondon de E-kurso en la Pionira domo en Třinec. Post komencaj malfacilaĵoj aliĝis al 1a kurso por komencantoj 16 gelernantoj, precipe el la III-a ĉeĥa okjara lernejo en Třinec. Tiun ĉi komencan sukceson ni atingis dank' al s-anino Hrochová, kiu pritraktis la aferon de E-rondeto en la Pionira domo kun lernejestroj de ĉeĥaj lernejoj en Třinec kaj kun la estro de Pionira domo.

Ankaŭ el la pola lernejo anoncis sin en la kurson kelkaj gelernantoj. Ĉar fine de majo finiĝas la agado en pioniraj rondetoj, estis decidite, ke tuj post la ferioj ni denove komencos E-kursojn por ĉeĥaj kaj polaj infanoj.

Inter junaj adeptoj de Esperanto montriĝas granda intereso kaj fervoro por la Inrernacia lingvo. Ili malpacience atendas la tempon, kiam ili povos ekkorespondi kun eksterlandaj samaĝuloj. Ni petas vin, bonvola sendi salutkarton kun instigaj vortoj al: Dŭm pionýrŭ a mládeže, Espertanto-fako, Třinec, Ĉeĥoslovakio. - Ni dankas.

KVARONJARAĴ LABORPLANOJ EN OSTRAVA-VÍTKOVICE.

La E-grupo en VŽKG ellaboras por ĉiu kvarorjaro planon de siaj merkredaj pogramoj, kiu estas dissendata al ĉiuj membroj de la grupo kaj al la ceteraj grupoj en Ostrava kaj la ĉirkaŭaĵo. Tia sistema laboro altigas nivelon de la kunvenoj.

Al la patrona uzino VŽKG gratulis okaze de ĝia 130- jara jubileo 38 esperantistoj kaj societoj el 14 ŝtatoj. La atenton vekis tiuokaze eldonitaj bildkartoj kun Esperanta teksto.

FILMO PRI "SET" MIGRIS TRA OSTRAVA.

La grupo en VŽkG Ostrava-Vítkovice prunteprenis la filmon pri SET-Žimrovice kaj

aranĝis jam duan kluban programon pri Someraj Esperanto-tendaroj. Poste la filmo migris de unu Ostrava klubo al la alia: Hulváky, tramistoj Michálkovice, Poruba, Havířov. Plej sukcesa estis la vespero en Michálkovice, kie aliĝis al SET 12 personoj.

La filmo estas 8-milimetra, parte kolora, proks. Duonhora. Posedas ĝin ties aŭtoro J. Solnický, Opava, Holasická 53.

DU EKSPozICIAJ STANDOJ PRI ESPERANTO EN OSTRAVA.

Ĝuste la 1-an de majo, kiam al familianoj de la okupitoj en VŽKG estis permesite viziti la uzinon, estis malfermita en "Peza meĥaniko" ekspozicio pri kromprofesia laboro de la okupitoj. Unu el la plej belaj standoj apartenis al Esperanto. Venis 560 vizitantoj.

En la uzina lernejo de VŽKG en Kotkova-strato estis eta, sed impresa Esperanto-ekspozicio en la tagoj 10. - 30. 5. 59.

E-rondeto ĉe ZK ROH de la minejo 1-a MAJO en KARVINÁ preparas E-ekspozicion por la tagoj 14. - 20. 6. 1954.

"JISKRA" (Fajrero) DE VŽKG ENKONDUKIS ESP. RUBRIKON.

Tiu ĉi uzina gazeto aperanta en 8000 ekzempleroj ekde la 8-a de majo 1959 alportas dufoje monate regulan rubrikon "Ze života esperantistů" (El la vivo de esperantistoj). La enhavo estas konsciencie preparata fare de la redaktoro s. Zábranský el la koncerna redakcio kunlabore kun la E-rondeto en VŽKG kaj "Fajrero". Ĝi certe estas loka sukceso kaj imitinda ekzemplo por la ceteraj grupoj.

PRI ESPERANTO-KURSOJ RAPORTAS:

OSTRAVA: La 18-an de majo komenciĝis nova elementa kurseto ĉe tramistoj. Instruas s. Vl. Slaný.

KARVINÁ: Aŭtune 1958 frekventis A-kurson 15 personoj. Printempe 1959 A-kurson 10 kaj B-kurson frekventis 5 personoj. Instruis s. A. Odehnal.

ČESKÁ TŘEBOVÁ: En la fervojista industri-lernejo studas Esp. proks. 10 studentoj. La studrondeton gvidas s. Bohumil Obenauz, ilia pedagogo.

HLINSKO v č. : En la 11-jara lernejo instruas prof. Václav Dvořák 20 gestudentojn el 9-11-a klasoj. La stud-rondeto apartenas al ČSM. La nomita s-ano intencas post la ferioj gvidi E-kurson en Pionira domo.

OSTRAVA – LEIPZIG. Kvin membroj de E-grupo en Ostrava - Michálkovice (minejo P. Cingr) vizitis kun la uzina ekskurso la printempan foiron en Leipzig, kie ili sukcesis viziti esperantistan kunvenon kaj ĉeestis la ĝojigan raporton pri starigo de Esperanto-komitato en kadro de pac-movado en Germana Demokratia Respubliko.

ESPERANTISTOJ INSTRUAS PRI GEOGRAFIO.

La uzina klubo de Slezan en Frýdek-Místek, E-fako, kontraktis kun la komisiono por klerigo kaj eduko ĉe la nomita uzino la planon de popularaj vesperoj pri geografio por laboranta junularo. La aranĝoj estas nomataj: "Super la karto de l' mondo": (ĉiam marde!)

16. 6. 1959 18,15 – temo: "Suda Ameriko" (Prof. Busek),

14. 7. 1959 18,15 – temo: "Afriko" (D-ro B. Kališ),

11. 8. 1959 18,15 – temo: "Aŭstralio" (D-ro B. Kališ),

15. 9. 1959 18,15 - temo: "Azio" (Prof. Busek).

La prelegontoj estas membroj de la E-rondeto. La aranĝojn administras s. M. Bartovská, Slezan 01, Místek.

INFORMOJN PRI ESPERANTO-ARANĜOJ k. s. ne forgesu ĉiam sendi ankaŭ je adreso: ZK ROH Bytostav n. p. , Esperanto-rondeto, Ostrava 16 — Poruba.

VARSOVIA VESPERO. E-rondeto en Písek (ĉe Jitex) 14. 4. aranĝis "Varsovian vesperon", kies ĉefa programero estis aŭskultado de invit-programo de la kongresa komitato, per magnetofono. Ĉeestis ankaŭ 9 frekventintoj de finita A-kurso.

Verdaj splitoj el la mondo briktoj de la konstruaĵo

NOVA POZICIO de MONDPACA ESPERANTO-MOVADO en ĈSR.

Ĉs. Esp. -komitato traktis kun ĉeĥoslovaka sekcio de MEM pri kunlaboro kaj koordinado de la agado en la sekcio. Estis decidite, ke ĈEK reprezentos ĉs. Esperantistojn – pacdefendantojn en MEM. ĈEK eldonos ankaŭ la ĉeĥoslovakajn numerojn de la gazeto PACO.

LA BIBLIOTEKO de ESPERANTISTA KLUBO en PRAHA ricevis apartan ejon en proksimeco de Malnovurba placo. Nacia komitato per sia dekreto jam esprimis konsenton pri la luo. La biblioteko (preskaŭ 4000 malsamaj volumoj) estos malfermita post adaptaj laboroj.

"VERDA ĈARO DE JULIO BAGHY", teatra rondeto de EK en Praha, preparas programojn por 2 - 3 aktoroj. Krome ĝi surbendigas Esperantajn recitadojn kaj teatraĵojn. En preparo estas surscenigo de la dramo "Ĉasta flirtulino" de J. P. Sartre. Grupoj, kiuj havas intereson pri gastigo de la kolektivo aŭ pri magnetofonaj sonbendoj, skribu al adreso de ĈEK: Ĉs. esperantaký výbor (Verda Ĉaro), Osvětový ústav, Praha 12, Blanická 4.

REDAKCIO DE "MLADÝ SVĚT" (Juna Mondo) eldonata de la Centra komitato de ĈSM kunlaboros kun redaktoro de la "Bulteno" de Esp. klubo en Praha. Informojn represindajn en Mladý svět sendadu al la redaktoro: Jiří Havlík, Plamínková 12, Praha 7.

"ODPOVEDE NA OTÁZKY" (Respondoj je demandoj) n-ro 5 publikigas kelkpaĝan favoran artikolon "Mondlingvoj kaj Esperanto" de D-ro Gorazd Hofer. Per tiu ĉi artikolo la redakcio respondas al pluraj demandintoj, ekz. F. Kejík el Zvoleň, I. Baláš el Nitra k. a. Ni konstatas, ke skribado al redakcioj de nacilingvaj gazetoj iam alportas fruktojn.

En la artikolo estas en konciza formo menciita ĉio plej grava pri la lingvo, ties historio, literaturo kaj la nunstato. La artikolo estas finita per la vortoj: "En nia kultura vivo Esperanto meritas honoran lokon, se ĝi devas esti efika rimedo de daŭra interkompreniĝo kaj amikeco inter la nacioj, rimedo por konservi kaj firmigi la mondpacon. " - La gazeton eldonas Slovaka eldonejo de politika literaturo, Bratislava, ul. Ĉs. armády 24.

ĈEĤA LITERATURO EN "LA SUDA STELO"- 1958. En la pasintjara jarkolekto de tiu ĉi Esperanta literatura gazeto aperanta en Ljubljana estas abunde reprezentita nia literaturo, plejparte en la 5-a n-ro (ĉeĥa n-ro).

El la poezio estis publikigitaj 10 poemoj en traduko de J. Kořínek. Aŭtoroj: P. Bezruč, J. Seifert, A. Sova, A. Trýb, J. Wolker. Originaloj de J. Kořínek kaj E. Urbanová.

Ĉeĥan prozon reprezentas K. Čapek, J. Hašek, J. Mareš en traduko de J. Chvosta el Poděbrady. Monografiaj artikoloj kaj skizoj traktas pri P. Bezruč, K. Čapek, J. Mareš, J. Wolker, J. Lada, E. Urbanová. - Krome M. Lukáš kaj Joko kontribuis per la artikoloj: "Fluga

rigardo al la nuntempe ĉeĥa literaturo" kaj "Super lastaj dek jaroj de ĉeĥa literaturo".

Sur paĝoj de "La Suda Stelo" estas ankaŭ reproduktaĵoj de ĉeĥaj artistoj: J. Čapek, O. Gutfreundt, Fr. Hudáček, J. Kubíček, B. Kubišta, K. Svolinský, M. Švabinský, J. Lada kaj ankaŭ de E. Urbanová.

En la junulara gazeto "La Progreso" (Ljubljana) en j. 1958 aperis nomoj de Zd. Jirotko, S. Nová, E. Sejček, A. Fialka. - Originale kontribuis J. Kořínek.

SCIIGOJ EL HUNGARLANDO. La ŝtata Lernolibro--eldonejo pretigis novan lernolibron de Julio Baghy pri Esperanto en la serio "Ni lernu fremdajn lingvojn".

Gegimnazianoj de Prof. A. Pechán prezentis en la "Konkordo"- Esperanto-fakrondo, scenon el la "Revizoro" de Gogol. Ilia amatora rondeto "Verda Laŭbo" kelkfoje sukcese prezentas ion por amuzi en kunvenoj kaj kulturvesperoj. Post alveno de FAJRERO n-ro I ili tuj prezentia la "Formaliston dum libertempo" de K. I. Gaczynski.

En la Poŝtista Sindikata Klubdomo sukcese finiĝis la kurso de Julio Baghy. Dum la ferma festvespero prezentis belan amuzan programon membroj de la poŝtista, fervojista, blindula k. a. fakrondoj.

Infana revueto ilustrita "Tábortüz" (Tendarfajro) en Budapeŝt aperigis krucenigmon, kies ĉefa solvo estis vortoj pri Zamenhof kaj Esperanto. En multaj numeroj ĝi enhavas adresojn de eksterlandaj geknaboj, kiuj deziras koresp. en Esperanto! Skribu al ĝia redaktejo: K-dino Anna Kun, Tábortüz, Budapeŝt VIII, Gyulai Pál u. 14.

LA 44-a UNIVERSALA KONGRESO EN VARSOVIO. (1.-8.8.) Ni sekvas la preparojn, kvankam niaj esperoj partopreni vaniĝis. El la "Dua oficiala bulteno" ni citas:

La Oficiala Postkongreso okazos de la 9-a ĝis la 12-a de aŭgusto en Krakovo, unu el la plej idiliaj mezepokstilaj urboj de Pollando.

La pola Ministerio por Poŝto decidis eldoni en 1959 poŝtmarkojn honore al la centjara datreveno de la naskiĝo de D-ro L. L. Zamenhof.

KONCERTOJ DE POLA ESPERANTO-ENSEMBLO okazis en Varna, Plovdiv kaj Sofio. - La naŭmembra ensemblo konsistas el profesiaj artistoj de la Pola Radio kaj Varsovia Televido. Celo de la turniro tra Balkan-landoj estas propagandi la 44-an Universalan Kongreson en Varsovio. NB 59-2

GEODETOJ KUNSIDOS EN KRAKOVO. "La Geodezia Komitato de Pola Akademio de Sciencoj afable invitas vin partopreni en la Unua Internacia Kolokvio (scienca kurso) de Geodeziaj Kalkuloj, kiu okazos en Krakovo de la 9-a ĝis la 13-a de septembro 1959."

Tiel la organiza komitato de la geodezia kolokvio invitas en Esperanto sciencajn, geodeziajn centrojn kaj interesiĝantajn geodetojn, astronomojn el eksterlando al partopreno en la kolokvio.

La kolokvio enhavos la prelegojn de polaj geodetoj kaj astronomoj pri la temo de l' teorio kaj praktika uzo de krakovja kaj nukleara algebro (algebro de multmezuraj sinsekvoj) en geodezio kaj astronomio, la uzado de helpaj simboloj en geodezio kaj de krakovja algebro en konstruado. Krome okazos prelegoj pri la modernaj kalkulmaŝinoj, pri plej novaj plibonigoj de klasikaj metodoj kaj ankaŭ la prelegoj de invititaj aŭtoroj el aliaj landoj pri novaj geodeziaj kalkulmetodoj, kiuj disvolviĝas eksterlande. Adreso: Pola Akademio de Sciencoj - Geodezia Komitato, La organiza komitato de la Unua Internacia Kolokvio de Geodeziaj Kalkuloj, K R A K Ó W, Al. Mickiewicza 30, (A.G.H.), Poll.

LA PREZIDANTO DE LA POLA AKADEMIO DE SCIENCOJ NEAS,
KE ESPERANTO ESTAS ARTEFARITA LINGVO.

Varsovio (IGS). En intervjuo, donita al "Pola Esperantisto", Prof. D-ro Kotarbinski, prez. de la Pola Akademio de Sciencoj, neas, ke Esperanto proksimas al la logistika simboliko. Kontraŭe, la intervjuito asertas, ke la Internacia lingvo ne estas lokigebla en la difino "artefarita lingvo", ĉar ĝi konsistas el elementoj de etnikaj lingvoj, kaj la lingvoj vivantaj estas ĝia modelo. Prof. Kotarbinski fine emfazas, ke li ĝojas "pro la simpleco kaj la perspektivoj, kiujn Esperanto malfermas antaŭ homoj, ne havantaj eblecon posedi 2 - 3 ĉefajn eŭropajn lingvojn".

RESTARIGO DE LA E-MOVADO EN JALTA EN SOVETUNIO.

Ekspozicio, kursoj, artikoloj en "Kuraĉloka ĵurnalo", societo ĉe la urba biblioteko. En la vintra sezono okazis 7 studrondoj de Esperanto. Vizitonte Jaltan nepre kontaktigu kun: M. Cimberov, vicprezidanto de la Jalta Esperanto-sekcio, Sovetunio, Krimeo, Jalta, str. Kirova 10, kv. 1.

DIPLOMA VERKO PRI ESPERANTO. En kunsido de la Ŝtat-universitata Katedro en Sverdlovsk (Sovetio) V. M. Vajner defendis sian diploman verkon pri la temo: "La internacia lingvo kiel objekto de scienca esploro (per-esperanta materialo)". Tiu ĉi verko konsistas el tri partoj:

1. Ebleco pri starigo de la problemo,
2. Esperanto kiel objekto de lingvistika esploro,
3. Kelkaj demandoj de la teorio pri la internacia lingvo.

La verko estis pritaksita kiel "bonega". (Laŭ NB 59-4)

ĈE LA KAUNAS'A JUNULARA TEATRO FONDIĜIS E-KURSO kaj rondeto. Aliĝis 30 geaktoroj, kiuj fervore ekstudis la lingvon. Bonvolu sendi salutleterojn. Geaktoroj, ligu kontakton kun viaj gekolegoj en Kaunas! Adreso: Jaunojo Ziurovo Teatras, Esperantorondo, Ign. Balčiunas, Kaunas, Litova SSR.

BULGARA LITERATURA GAZETO "LITERATUREN FRONT" en Sofia skribas pri "Eperanta Antologio", antaŭ nelonge aperinta en redakto de William Auld: "La Esperanta Antologio, per kies paĝoj oni perceptas la spiron de la kultura mondo, respegulas la vojon de la rapide evoluanta originala Esperanta poezio, pruvante la valorajn kvalitojn de Esperanto, konvena al ĉiuspeca literatura uzo."

Laŭ HDE 59-9

EN LA NACIA BIBLIOTEKO "VASIL KOLAROV" EN SOFIO estos starigita granda Esperanto-fako. La biblioteko helpas la aperigon de Bibliografio de la bulgaraj Esperanto-eldonaĵoj, preparata de la Bibliografia Sekcio ĉe la Bulgara Esperanto-Instituto. Laboristoj de la biblioteka presejo promesis presigi bulgaran eldonon de Esperanto-ŝlosilo kaj klopodi pri tuja kaj korekta presigo de katalogaj slipoj de la Esperanta literaturo. Al la Esperanto-kurso aliĝis 15 bibliotekaj laborantoj.

EN 34 LERNEJOJ DE SLOVENIO oni instruas Esperanton. Entute enskribiĝis pli ol 1100 infanoj.

EN BRAZILAJ LERNEJOJ eblas instrui Esperanton laŭ la leĝo 1194 (24.12.1958). Espereble en diversaj brazilaj urboj oni dekretos la enkondukon de la instruado de Esperanto en

lernejojn dum la nuna jaro. HDE 59-7

JAPANA ASOCIO DE UNIVERSITATAJ DIPLOMITOJ, havanta prokalmume 75.000 membrojn, decidis eldoni Esperantan tradukon de nova verko de sia direktoro, D-ro Sanehide Komaki: "Daŭrigo: La respekto de l' vivo".

LA INDONEZIA VERKISTO LIEM TJONG HIE publikigis en Semarang artikolon, en kiu li prezentas lingvan problemon de la azio-afrikaj popoloj en 9 tezoj: La azio-afrikaj popoloj ne povas rezigni de siaj naciaj lingvoj (la aŭtoro klasigas 40 el ili kiel ĉefajn) por ne kaŭzi likvidon de la koncernaj kulturoj. La Azio-Afrika Unuiĝo ne povas ekzisti sen la ligilo - komuna lingvo. La aŭtoro proponas Esperanton, kiu ne nur garantias la respekton de ĉiuj nacioj, pluekziston de ĉiuj lingvoj kaj kulturoj, sed ebligas ĉiajn interrilatojn.

EN HAIFONG, la ĉefa haveno de Norda Vietnamio, la E-movado rapide disvastiĝas. E-rondoj estas organizitaj ekzemple en la liceo Ngo-Quyen, en la armeo, ĉe la junularo ktp. La kursojn partoprenis pli ol 200 personoj.

ESPERANTO-STRATOJ, PLACOJ, PARKOJ. Laŭ la 13-a punkto de la "Baza programo de la aranĝoj okaze de la Zamenhof-jaro" la landaj kaj lokaj organizoj zorgu pri tio, ke en kiel eble plej multe da lokoj po unu strato aŭ placo ricevu la nomon de Zamenhof aŭ de Esperanto. La fakto, ke jam ĉirkaŭ 100 urboj havas stratojn kaj placojn laŭ la nomo de Zamenhof aŭ Esperanto, faciligos tiun klopodon.

Lastaj sciigoj pri la nomigo: Ragusa en Sicilio, Polski Trambes (Bulgario), Bělohrad (ĈSR)-Zamenhof-aleo.

• NI DISKUTAS PRI INFORMADO

En lasta tempo la redakcio estis kelkfoje atentigita je propagando, aŭ kiel oni rekomendas esprimi sin, informado. Ni atendas, ke post apero de tiu ĉi numero skribos al la redakcio pluraj esperantistoj, kiuj surbaze de siaj spertoj eksplikoa sian opinion, skizos novajn formojn de nia informado. El la leteroj jam venintaj ni citas iom por instigi vian intereson. Unue el la letero da A. V. Zedník:

"Diru al mi, kara kamarado, k i a l oni ne faras ian publikan kaj speciale nepublikan - do de persono al persono direktatan seriozan propagandon por Esperanto, sed ne nur inter amuzema junularo, kiu estas facile varbebla por ĉiu ajna ŝerca amuzo, sed ne preferas varbi inter junaj seriozaj fakuloj ĉiuspecaj? Kial niaj pli spertaj samideanoj ludas kun gramatiko kaj poemoj, klopodante eltrovi novajn neologismojn, sed neniel helpas al tiuj, kiuj laŭ ilia opinio ankoraŭ neperfekte posedas Esperanton, sed kiuj en Esperanto ne vidas nur ilon, sed uzas ĝin por seriozaj celoj?"

Kial oni ne eldonas varbfoliojn ĉeĥ- kaj slovaklingvaj kaj plipaĝajn informilojn pri la praktika uzebleco de Esperanto por la paco kaj progreso?

Kaj ĉu vi ne scias, ke finfine ni ĉiuj esperantistoj, ne ni volas akiri la favoron de niaj oficialaj organoj, ne povas agi alie ol forlasi la neŭtralan sintenon kaj devas komenci uzadi Esperanton por helpi la socialismon? Ĉu la ekzemplo, kian donas al ni niaj bulgaraj kaj ĉinaj fratoj ne estas sufiĉe instrudona?

Mi ege ŝatus vidi en ĉiu numero de via "Fajrero" kiel aldono unu separatan folion, kian oni povus ĉe vi mendi por malmultekosta prezo, kiu estus skribita en la ĉeĥa aŭ slovakaj lingvoj kaj kiun oni povus uzi por popersona propagando perpoŝta?

Ĉu junaj anoj, kiuj jam iom perlaboras, ne povus promesi al si, ke ili libervole ĉiun

tagon sendos almenaŭ po unu informa folio, afrankita klel "Presajfo" per 20 helera poŝtmarko, al diversaj konataj personoj de ilia loĝ-loko aŭ ĉirkaŭaĵo?"

S-ano D. Koĉvara skribas pri alia aspekto de informado:

"Estas konata fakto, ke esperantistoj estas entuziasmaj propagandistoj kaj en kelkaj okazoj ni devas ilian aktivecon eĉ bremsi, ĉar ilia troa fervoro malutilas. Mi opinias, ke estas grave diri kelkajn vortojn pri tio, kien direkti nian propagandon, ke ĝi puŝu nian movadon antaŭen. Plej ofta manko en nia traktado kun oficialaj instancoj estas, ke ni parolas pri facileco de Esperanto, pri ĝia interna paca ideo, pri korespondado, literaturo, gazetoj, radioelseadoj. Tiuj faktoj efikas bone, kiam ni varbas kursanojn. Sed ĉe oficialaj instancoj ni devas informi ĉefe, kion al ni alportas Esp. movado, kiel la lingvo servas en paca batalo, pri la rolo en internacia kultura interŝanĝo. . ."

Modela por ni povas esti Kongresa Gazetara Servo en Varsovio, kiu aranĝis tutlandan gazetaran konferencon. Partoprenis kvardeko da ĵurnalistoj, radio-kronikistoj, pres-ataŝeo de DDR kaj reprezentantoj de du grandaj inform-agentejoj. La tono de la aranĝo estis altnivela kaj donis seriozan impreson. Oni klopodis eviti sian aspekton de propagando, zorganta ampleksan kaj objektivan informadon. La konferenco speciale akcentis la praktikajn utiligojn de la Internacia lingvo. (laŭ HDE 59-9)

Komencante la publikan diskuton pri la informado, ni konsideras utila represon de la 13-a punkto el la "Fundamenta principaro de informado pri la Internacia lingvo" - pri ĉefaj eraroj:

- a) Nomi la lingvon artefarita, helpa, verda k. s.; oni ĉiam nomu ĝin aŭ la Internacia Lingvo aŭ Esperanto;
- b) superflue menciadi diversajn projektojn de komuna lingvo;
- c) ne distingi nete inter Esperanto kiel vivanta lingvo kaj tiuj projektoj, se la cirkonstancoj devigas paroli pri ili;
- d) uzi en nacilingvaj tekstoj esperantajn esprimojn, ekz. "samideano", "Majstro", "verdstelanoj" k. s.;
- e) skribi pri Esperanto en nekorekta nacia lingvo;
- f/ nomadi la informadon pri Esperanto "propagando";
- g) doni al la Esperanto-movado sektecan karakteron (tro multe da steloj kaj flagoj, kantado de la himno kaj aliaj kantoj en nekonvenaj tempo kaj loko, strangaĵoj en la vestoj dum kongresoj kaj aliaj publikaj kunvenoj k.s.). **LA ERAROJ EN LA INFORMADO MALPROKSIMIGAS DE ESPERANTO DEKMILOJN DA PERSONOJ KAJ KAŬZIS FORTAN KOMPROMITIĜON DE LA MOVADO EN MULTAJ MEDIOJ."**

La kontribuaĵojn pri ĉi temo adresu al la redakcio de Fajrero. Fermo de la 3-a n-ro proksimume la 5-an de julio.

LINGVA ANGULETO:

Lastatempe mi plurfoje aŭdis eraran uzon de la prepozicio "DA", nome post baza

numeralo, plej ofte post "mil" (ekz.: tri mil da kronoj). DA estas uzenda nur post substantivigitaj numeraloj entjeraj (ne frakcioj), ekz.: miloj da kronoj, dekduo da koboldoj, deko da butonoj. . .

Tamen atentu la nuancon:

dek butonoj - deset knoflíků,

deko da butonoj. - asi deset knoflíků.

La prepozicion DA ni uzas, kiam ni havas difinitan (ne devas esti preciza!) kvanton, nombron, pezon, gradon en rilato al substantivo nedilinita. Ekz.: poto da lakto, peco da tolo, . . .

Werner

LEKANTETO

PORINFANA PAĜO DE FAJRERO

KOKO KAJ HUNDO

Foje vivis avo kaj avino. Ili estis tre malriĉaj kaj havis nur kokon kaj hundon. Sed la koko kaj hundo ofte malsatis. Unufoje diris la hundo al la koko: "Iru, frato Petko, ni forkuros en arbaron, ĉi tie ni fartas malbone." "Bone, ni forkuros", diris la koko, "pli malbone ni ne fartos!" Kaj ili iris, iris tutan tagon. Komenciĝis vespero. La koko kaj hundo trovis en la arbaro kavan arbon. La koko ekdormis sur la branĉo kaj la hundo dormis en la truo. Matene la koko vokis: "Kokerikiii!" La kokon ekaŭdis vulpo. Ĝi deziris havi kokan viandon. La vulpo iris al la arbo kaj diris: "Tio estas bela koketo. Tian birdon mi ankoraŭ ne vidis. Multkoloraj flugiloj, voĉo kiel sonorileto – iru al mi malsupren, belulo!" "Kaj kial?", demandis la koko. "Mi invitas vin al mi je vizito. Mi vivas en nova loĝejo kaj havas por vi pizojn!", diris la vulpo. "Bone", diras la koko, "sed sola mi ne povas iri. Mi estas ĉi tie kun kamarado." – "Mi havas hodiaŭ feliĉon", pensis la vulpo. "Anstataŭ unu koko estos du". "Kie estas via kamarado?", demandas la vulpo. "Ĉi tie en la arbo li dormas", respondis la koko. La vulpo venis al la truo, sed la hundo elsaltis kaj la vulpon disŝiris.

Verkis la fratinoj Jana kaj Ludmila Šemberová (Lanškroun)

PRI GRANDA RAPO

Avo plantis rapon kaj ĝi elkreskis alta kaj granda. Foje la avo iris al la kampo eltiri ĝin. Li tiris, tiris, sed la rapon ne eltiris. La avo vokis avinon. Tiris la avo, tiris la avino, ili tiris, tiris, sed la rapon ne eltiris. La avino vokis nepinon. Tiris la avo, tiris la avino, tiris la nepino, ili tiris, tiris, sed la rapon ne eltiris. La nepino alvokis hundon. Tiris la avo, tiris la avino, tiris la nepino, tiris la hundo, ĉiuj tiris, tiris, sed la rapon ne eltiris. La hundo vokis katinon. Tiris la avo, tiris la avino, tiris la nepino, tiris la hundo, tiris la katino, ĉiuj tiris, tiris, sed la rapon ne eltiris. La katino alvokis muson. Tiris la avo, tiris la avino, tiris la nepino, tiris la hundo, la katino kaj la muso tiris, ĉiuj tiris, tiris kaj la grandan kaj altan rapon feliĉe eltiris.

Verkis Jana Telyčková
(Lanškroun)

KIO ĜI ESTAS?

Unu ĉapeleto, unu piedeto,

sidas en musko ĉe arbeto - ?

Kiam vi ĝin prenas, ĝi krias,
kiam vi ĝin lasas, silentas - ?

Trovu la danĝeran beston.
x . . . nokte lumas sur la ĉielo
x . . . ĉeĥa rivero Esperante
x . . . vorto por multiplikado
x . . . vintre estas blanka
x . . . manĝaĵo por hundo aŭ parto de korpo

(Solvo *venonte!*)

KNABOJ, ĉu ankaŭ vi skribos al "LEKANTETO"?

=====

ESPERANTO SOCIETO DE BOBBAJ

7/A, Balgovindas Road, Near Shivaji Park, MAHIM BOMAJ -15, HINDUJO

La societo projektas energian kampanjon por disvastigi la lingvon kaj plifortigi la movadon en Hindujo okaze de la Zamenhof-jaro. Esperanto devas solvi la lingvan problemon ne nur en Eŭropo, sed ĉie. Kaj la renaskiĝinta Azio sendube ludos pli kaj pli gravan rolon en la mondaferoj. Ni citas el la letero sendita de la menciita societo:

"Nia movado certe ne estas forta ĉi tie, kaj ni staras antaŭ malfacila tasko. Ni do turnas nin al vi por peti vian valoran helpon. Por la planataj ekspozicioj (dum decembro ĉi-jare) en gravaj hindaj urboj ni bezonas materialon el ĉiuj landoj: librojn, gazetojn, ĵurnalojn, afiŝojn, flugfolietojn kaj Esperantajn kaj nacilingvajjn, fotografaĵojn de viaj grupoj ktp. - mallonge, ĉion, kio montras la gravecon kaj la utilecon de Esperanto. Povas esti materialo, kiun vi ne plu bezonas. Ni jam antaŭe kore dankas pro via helpo, kaj ni volonte konfirmos la alvenon de event. sendaĵo."- Prez. :Rama Hegde

Nia lirika rusa veterano

— poeto GEORGO DE ŜKIN

en Miĉurinsk eĉ nun daŭre verkas kaj eĉ skribas am-poemojn. Li dediĉas ilin al malproksima korespondantino. Jen unu el liaj "perloj":

AMO KAJ MORTO

En am' mirinda estas forto,
miraklojn kreas ĝi al hom'!
Pli forta, tamen, estas morto,
min terurigas ĝia nom'.
Neevitebla, senkompata,
ĝi vagas tre proksime jam. -
De ĝi min savi, ho, amata,
ne povas tuta Via am'.

Ni amike salutas la 68-jaran, eterne junan poeton!

Míla Němcová:

Poemo pri bona vorto

Sablodezertoj,
timo al ventoj,
vipura veneno,
tim' pro soifo,
timo pro homoj,
timo pro tempo,
kiu preter ni pasas,
ĉio min skuis,
antaŭ ol vi eldiris
vian bonan vorton.

Mi jam ne acias,
kie mi renkontis vin,
ĉe kiu horizonto
estis la lando,
mi jam ne scias
kiafoje mi iras
trans altan monton,
sur mallarĝa ora kornico,
kaj mi ne timas
ĝis fundo de plej profunda maro
por la amo descendi.

Trad. J. Marek

Jaroslav S e i f e r t:

El "Dekduo da pantomimoj pri amo"

Sennoma verda riĉo
per floroj min ravas.
Nun sen la superstiĉo:
la nomoj ne gravas!

Trad. J. Mevo

ĈU VI MEMORAS?

Post la laborfino mi iris promene al mia hejmo. Mi intence elektis la vojon tra parko. Almenaŭ iom da freŝa aero mi tiel ĝuos. Mi promenas, enspiras la aeron per plenaj

glutkvantoj kaj aŭskultas la kantadon de birdetoj. La suneto agrable varmigas mian lignitan korpon el la sensuna kancelario.

Subite mi ekaŭdis interesan interparolon:

"Ĉu vi memoras, Helena, nian unuan renkontiĝon? De tiam ĝuste hodiaŭ pasas la dekkvara jaro. Mi tiam renkontis vin ploranta sur la benko en parko. Mi alsidis kaj demandis vin, ĉu mi povas iamaniere helpi al vi. Komence vi ne rimarkis min kaj post ripeto de mia demando vi surprizite rigardis min. Post momento, kiam iomete silentiĝis via kora plorado, vi respondis: - Oni arestis mian patron kaj la patrino kuŝas malsana en malsanulejo. - Mi poste konsolis vin, ni komune malbenis la faŝistojn kaj nian indignon fermis dolĉa kiseteto kaj promeso de la kontraŭbatalo. Ĉu vi memoras, kara, la sekvantajn terurojn, kiujn ni travivis dum la milito? Kaj hodiaŭ iuj senhontuloj denove timigas nin per la milito."

"Jes, vi pravas, Petro, unuj teruroj pasis, sed novaj, ankoraŭ pli danĝeraj atendas. Atendas malantaŭ kulisoj de la homa sceno. Ĉu la homaro trovos sian prudenton? Ĉu niaj infanoj vivos pli feliĉe ol ni?"

La respondon mi jam ne aŭdis, ĉar mi foriris. Kaj mi pensas, ke pli multaj homoj devus aŭdi similan interparolon.

MIRO

I-a KATEGORIO, tasko 3-a:

Priskribu libere ian okazaĵon en via lerneja, uzina aŭ oficeja kolektivo. Povas esti ankaŭ priskribo de via laboro, labor-medio ktp. Amplekso: 1- 2 paĝoj de formato A5.

Tasko 4-a: Traduku:

1. V naší škole začal kurs esperanta. 2. Otec právě vítal svého starého přítele. 3. Chlapec se zastavil a pozoroval nás. 4. Její šaty se velmi lišily od těchto. 5. Voda stříkala velmi vysoko.

II-a kategorio, tasko 3-a:

Homo povas amuzi sin en teatro, kinejo, cirko, kabareto, en rondo de geamikoj, homon ankaŭ amuzas pentrado, modlado, sportoj, turismo kaj cent-foje ktp. Ĉiu unuopulo diferencas disde la alia, ĉiu havas siajn specifajn amuzojn, marotojn ("ĉevaletojn"), sopirojn. - Via tasko estas priskribi vian plej ŝatatan amuzon. Spertuloj en pensado kaj verkado povas enmeti psikologian analizon de sia personeco (povas esti 3-a verba persono), de la medio kun ties efiko. La formo de la priskribo povas esti plej diversa.

Elektu unu el la jenaj:

1. Rakonto - priskribo - letero k.s. en libera konstruo.
2. Felietono - la temon riĉigu per interesaj, instruaj motivoj kaj aktualigu. Konvenas ankaŭ satira tono.
3. Eseo - scienca temo kaj artisma lingvo karakterizas ĝin.
4. Unuaktaĵo - povas esti ankaŭ en formo de monologo aŭ dialogo, eble satira.
5. Versaĵo - la formo dependas tute de vi. Tamen ni aldonas, ke estas bezonataj konvenaj tekstoj por tendaraj, societaj kaj kabaretaj kantoj. Provu do provizi niajn komponistojn!

Tasko 4-a: Traduku:

1. Když se začal učit, kurs právě skončil.
2. Vešel jsem právě, když otec vítal nějakého staršího pána se slovy: "Těší mě vaše návštěva!"

3. Chlapec se zastavil a pozoroval právě se rozvinuvší souboj odvěkých soupeřů.
4. Její šaty se velmi lišily barvou od okolí.
5. Vrátil jsem se celý ušpiněný a postříkaný blátem právě v okamžiku odjezdu.

La 3-an kaj 4-an taskojn sendu al la redakcio antaŭ fino de julio, se la pres-pretigo estos ree prokrastita, do unu monaton post la apero de ĉi numero. Red.

SET ČERVENÁ n/Vltavou - aranĝas E-rondeto de EK ROH Jitex en Písek. La tendaro situos sur la maldekstra river-bordo 300 m de la fervoja ponto inter Tábor kaj Písek laŭ la fluo. Loĝado en grandaj armeaj tendoj po 10 personoj. Ekskursoj al la kastelo Zvíkov kaj historiaj urboj Písek, Tábor kaj Bechyně. La tendaro havos 3 etapojn:

5. - 18.7.1959 - kursoj: C (konvereacia), D (porinstr.)
- 19.7. - 1.8.1959 - kursoj: B (daŭriga), C (konversacia),
2. - 15.8.1959 - kursoj: A (elementa), B (daŭriga).

SET LANČOV u Vranovské přehrady – aranĝas E-rondeto de la Distrikta Kulturdomo en Třebíč. La tendaro situos kiel pasintjare sur Esperanta herbejo apud Arĝenta golfo de la lago. Loĝado en tendoj po 2-3 personoj. Ekskursoj al la kasteloj Vranov, Býtov, Cornštýn. - Du etapoj;

- 19.7. - 1.8.1959 - kursoj: A,B infaraj kaj B.
2. - 15. 8.1959 - kursoj: B,C.

INSTRUADO: 4-hora antaŭtagmeze. Instruos: Novotný, D. Kočvara, Vl. Kočvara, Werner, Jirečková, Berndt, Franc, Lorková, Valešová, Matušková, Kníchal k.a.

AĜO DE KURSANOJ: malsupra limo - 14 jaroj, en la infana 11 j.

KOSTOJ: Duesmajna restado inkluzive de 5-foja manĝo tage kaj kurskotizo estas 250 Kčs.

FERVOJRABATO: 50%-a por tiuj, kiuj aliĝis ĝis la 15-a de junio.

SEKRETARIO DE SET-59: Dieter Berndt, Nová Kamčatka, Petřvald u Karviné.

SOMERA KOLEGIO DE ESPERANTO en Banloko BĚLOHRAD.

12. - 25.7.1959 – aranĝas E-rondeto de OB en Bělohrad sub protekto de Ĉeĥoslovaka Esperanto-komitato.

KURSOJ: A, B, C, D (la kategorioj kiel en SET).

LOĜADO: en hotelo aŭ komuna tranoktejo, tereno por tendoj.

FERVOJRABATO: 50%-a - limdato: 30.5.1959.

KURSPAGO kaj LOĜpago: hotelo 206 (195) Kčs, tranoktejo 180 (170) Kčs. Enkrampe pagoj por pluaj familianoj.

KORESPOND-ADRESO: Kroužek esperantistů OB, k rukám s. J. Vinčálka, lázně Bělohrad 11-64.

REMALFERMO de la "Aleo de d-ro L. L. Zamenhof" en Bělohrad okazos dimanĉe 19.7. 1959 je la 10-a horo.

Vespera kanto

Muziko: Radim Kudla

Teksto: Vlastimil Novobilský

Teksto: Per mola paŝo venas
la nokto trans montara pont'.
La dormo zorgojn prenas,
nin gvidas al songrava mond'.

La kanton ellernu precipe la partoprenontoj en SET, ĉar ĝi estas kantata ĉiuvespere dum malhiso de la ŝtata flago.

CELKONSCIE KAJ NEKONTRAŬSTAREBLE. Malgraŭ politikaj revolucioj, malgraŭ du teruraj mondmilitoj kaj spite de la indiferento kaj atakoj, kiujn ki suferas, Esperanto paŝas antaŭen, malrapide, kiel la plej saĝaj ideoj postulantaj esencan pensoŝanĝon profunde enradikiĝintan ĉe la homa konscienco, sed certe, precize, celkonscie kaj nekontraŭstareble. G. Vassio (L'esperanto 42 Torino)

E. LANTI: La reciproka situacio de du malsamlingvanoj iel similas al tiu de bestoj antaŭ homoj.

Samspecaj bestoj en la tuta mondo blekas same; por ke la homoj ne malsuperu la bestojn tiurilate, ili devas praktikadi Esperanton.

Enigma kurso

Hodiaŭ ni ellernos kreí kaj solvi du novajn specojn de enigmoj. La unua estas

SUPERSIGNUMO.

Tiu ĉi enigmo estas ebla en la lingvoj, kiuj havas surersignojn (ĉeĥa) kaj kie tiaj supersignoj havas gravan rolon ĉe distingado de diversaj vortoj. Do ankaŭ en Esperanto.

Kelkaj vortoj, kvankam ilia senco estas tute malsimila, distingiĝas nur per la supersigno (unu aŭ du). Ekzemple: ĉelo—celo, lego—leĝo, pago—paĝo, sangi—ŝanĝi ktp.

..... estis parto de

Solvo: veŝto—vesto.

La dua enigmo nomiĝas ENMETUMO.

La vorto ŝanĝas sian sencon, se ni enmetas en ĝin unu literon. Ekzemple: pano—plano, salo—salto, ktp.

Matene la estis en . u. . . de nebuloj. Solvo: valo-vualo.

Kaj nun divenu vi mem:

2. Supersignumo:

Je oka kunvenis la por fari kantprovon.

3. Enmetumo:

Sur la balkono poeto romantika

kun gitar' eksidis.

Pro vana am' lia

Kaj pro l' angor' de lia mens' kaj sent'

sur lia gitar' la p.

J. Cink

(Solvo en la venonta numero!)

LA REDAKCIO KONTAKTAS KUN VI!

- Al la Leningrada Junulara Esp. Grupo "Aŭroro" ni dankas por bela unuamaja saluto.
- La Junularo Esperantista Brita, sekcio de BEA, salutas nian redakcion kaj la ĉeĥoslovakon jurularon okaze de sia fondiĝo en la 43-a Brita Kongreso de Esperanto. Dankon! kaj reciprokan saluton!
- S-ano Pál Balkányi el Budapeŝto salutas ĉiujn kunlaborantojn de "Fajrero". "...Kore mi deziras, ke oni ne malhelpu vian gazeteton - se oni ne helpas ĝin - kaj ĝi progresu kaj helpu solidare kunigi la laborantojn por paco, amikiĝo, progreso kaj internacia kulturo!"
Sinceran gratulon al s-ano Jan Molnár en Praha, kiu festas 50-jaran jubileon de sia esperantiĝo! - Li ellernis Esperanton en Vieno dum la gimnazia studo en 1909.

Libroj – prospektoj – recenzoj

MI VOLIS VIZITI LERNEJON - adaptita de Ŝju Gŭangju laŭ la rakonto de Gaŭ Ju-baŭ, bildoj de Ŭang Ŝju-jang kaj Pen Ĉing-ju. Esperantigis Liu Hung-kang. Eldonis: Ĉina Esperanto-Ligo, P. O. Kesto 77, Peking, Ĉinio. - Formato: 18 x 13 cm, 76 paĝoj.

La rakonto el la vivo de la aŭtoro estas serio de belaj tutpaĝaj bildoj kun akompanaj tekstoj. La juna heroo estas 12-jara Gaŭ Ju-baŭ, filo de malriĉe kamparano, kiu sukcesas veni en lernejon, sed post unu monato devas forlasi ĝin, ĉar per sia malriĉeco incitas fieran kaj kruelan bienulon kaj lian aristokratan fileton. En la konciza teksto kaj artistaj ilustraĵoj estas kortuŝe bildigita la panjo de Ju-baŭ kaj la bonkora instruisto. - La lingvo estas modela. Rekomendinda speciale al junularo. J. W.

WUPPERTAL. Aperis la unua Esperanta-prospekto pri Wuppertal - 12 paĝoj, dukolora, sperte redaktita fald-prospekto. Petante la prospekton skribu en Esperanta kaj menciu, ke vi deziras Esperanto-prospekton pri Wuppertal" ĉe: Presse- und Werbeamt, Wuppertal, Germana Federacia Respubliko.

ESPERANTO - lernolibro de Th. Kilian - plej ofte uzata kaj ŝatata - aperis en Jihlava, prezo 10 Kčs. Mendebila ĉe: Klub esperantistů při Městském domě osvěty v Jihlavě, Žižkova 12.

SET-koverttoj, SET-poŝtkartoj kaj fotografaĵo de la afiŝo pri 44-a U. K. en Varsovio estas mendebilaj ĉe: s. J. Badžgon, u p. Miŝurce, Ostrava-Svinov, Kolašikova 657.

ĈEĤA-ESPERANTA KUIRISTA VORTARETO. Eĉ sperta esperantisto troviĝas iam en embarasoj, kiam li sidas en restoracio kun eksterlandano kaj ne kapablas traduki al li mulron el la manĝo-karto. Antaŭ nelonge aperis en Jarlibro de UEA Gastronomia terminaro de ĉeĥa aŭtoro Erhard Urban. Esperantistoj en Písek laŭ ĝi eldonis propran vortareton ĉeĥa esperanta, kiu sur 44 poŝformataj paĝoj enhavas la plej kutimajn esprimojn. La multobligita vortareto estas ricevebla de la E-rondeto de uzinklubo Jitex, Písek kontraŭ 4 Kčs. Mendu ĉe: Julie Tesařovfá, n. p. Jitex. Písek.

De le sama adreso vi povas ricevi ankaŭ kajeron kun tekstoj de Esperantaj kantoj, precipe folkloraj, el nia lando kaj ankaŭ de aliaj nacioj. Ankaŭ ĝi kostas 4 Kčs.

Ĉu vi jam mendis la marŝon "VIVU ESPERANTO" de la aŭtoroj S. Doucek (muzika), Vl. Novobilský kaj J. Kořínek (teksto)? Ĝi estas eldonota post ricevo de 1500

mendoj. Prezo 4 Kĉs. Adr.: Hud. nakl. PANTON, Besední 3, PRAHA, Malá Strana.

JEN ESTAS HUNGARIO. 4-paĝa grandformata ilustrita informilo pri Hungarlando, eld. de IBUSZ Fremdultrafila, Negoca, Vojaĝa kaj Transporta AS. Budapest, V., Felszabadulás-tér 5. Interesuloj, petu ekzempleron de la eldonejo aŭ, sendante unu respondkuponon, de la Landa Esperanto Konsilantaro, Budapest 4, pfako 147. - La bela eldono praviĝas, ke IBUSZ pro siaj fremdultrafikaj agado kaj eldonaĵoj ricevis oran medalon en la Mondekspozicio en Bruselo.

ĈU APEROS BILDLIBRO PRI D-RO ZAMENHOF? Eble vi jam legis pri kolektado de ĉiuj fotoj, kiuj ekzistas pri Zamenhof. Samtempe kun jaroj forpasas ankaŭ homoj, perdiĝas ofte valoraj memoraĵoj pri la aŭtoro de Esperanto. Grave nin malriĉigis ankaŭ la lasta milito per detruo de la tuta familia Zamenhof-arkivo en Varsovio. Kaj ĉi tiu jaro 1959, la Zamenhof-jaro, estas bona stimulo por efektitivigi la belan projekton: eldoni kompletan bildaron pri la vivo de Zamenhof - infanaĝo en Bjalistoko, studjaro, en Varsovio kaj Moskvo, familia medio, kongresoj, vizitoj en diversaj landoj ktp.

Se la esperantistoj agos rapide, oni povos montri la bildaron jam en Varsovio dum la 44-a. La libro povos aperi en la komenco de 1960. Skribu ankaŭ, kiuj Zam. placoj, stratoj, parkoj, aleoj ktp. ekzistas en via lando. Se vi hazarde posedas kliŝon (aŭ volas kliŝigi kelkajn fotojn por via kaj nia bezono), sciigu ankaŭ tion. Pri la afero zorgas: Henk Thien, Uiterwaardenstraat 12/2, Amsterdam, Nederlando.

K O R E S P O N D / A N O N C O J :

40 ESTONAJ GEESPERANTISTOJ dez. kor. per let. kaj il. pk. kun ĉs. esperantistoj pri kulturo, liter., teatro, muziko, sporto, Esp. movado, lingvoj, arto k.a. temoj. Ankaŭ ints. il. ĵurnalojn, revuojn, fotojn, poŝtmarkojn, bildkartojn. Skribu amase indikante viajn interesojn. Respondo garantiata. Adreso: Sovetunio, Estona SSR, TORVA, Männikustrato 14, L. Tangsoo.

GRUPO DE 40 GEESPERANTISTOJ diversaĝaj, 18-55 j. dez. kor. kun geesp. de aliaj landoj, interŝ. il. pk. gazetojn, E-librojn k.a. Adreso: S-ino Elena Kovaĉeva, Str. T. Burmov 13, GABROVO, Bulgario.

DONACOJ POR FAJRERO. Ni kore dankas al: Střítavka V. Kladno 3 - Šťastný VI. ,Líbštát, 8 - Chrápavý A. Ostrava, 3 - Kobza, J. Herbortice, 8 - Sedláčková F. Kladno, p. R. Hromada, Praha, 8 - J. Švrček, Ostrava, 3 - A. Gabariková, Žilina, 6 - St. Werner, Těchonín, 8 - M. Valešová, Liberec, 8- R. Skalický, Ostrava - Lička Fr. ,Ostrava, 1- J. Kazda, K. Vary, 3- M. Vlk, Praha, 3- P.V. Straka, Tatenice, 3- J. Vitek, Mělník, 3 - n. Příběk, Ústí n/L. ,8 - J. Škvorecký, Náchod, 5 -- St. Majer, Troubelice, 1 - A. Franková, Třinec, 13 - Z. Horák, Brodek, 13 - . A. Svobodová, Jihlava, 3 (daŭr.)